


**FLANDRA  
ESPERANTISTO**






**MONATALE REVUO**

**ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO**

\*N.E.L.E.\* (Nia Estas La Estonteco)  
 Flandra Esperantista Grupo  
 Ejo \* Breughel \*  
 Em. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)

Oficiala Organo  
 de 

Flandra   
 Ligo   
 Esperantista 



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.  
 Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.  
 Eksterlando: 6 belgoj.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenestraat, 29, KORTRIJK

Poŝtekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,— bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,— »
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,— »
Ŝi — H. Rider Haggard	29,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,— »
La Homaj rasoj de la Mondo	24,— »
Kudlago, la malgranda eskimo	5,— »
La Juna Vivo (1934-1935)	15,— »
Pallietier — F. Timmermans	35,— »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,— »
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy.	18,— »
G-ja Lernolibro (ilustrita)	12,— »
Examenopgaven	12,— »
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,— »
Schidlof Zakwoordenboek	30,— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,— »

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1,— fr.

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:  
C. Schroeeyers  
Transvaalstraat, 10  
Berchem  
Antwerpen



Administranto:  
Adolf De Keyzer  
P. van Humbeekstr., 3  
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj  
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj  
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-  
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,  
H. VAN DURME kaj aliaj.

## Atentu !

## Grava Komuniko !

## Notu bone !

Depost la 1 a. de Julio, S.ro Adolf De Keyzer plenumas la oficojn de liga kasisto kaj revua administranto.

Ĉiujn pagojn por la ligo kaj la revuo pere de poŝtĉeko: 2321.50 de Flandra Ligo Esperantista Brussel. Okaze de mensekendoj ne forgesu samtempe aldoni la necesajn klarigojn rilate la pagojn kune kun indikoj de nomo(j) kaj adreso(j).

Adressangojn kaj ĉiujn plendojn rilate la neregulan ricevon de la revuo direktu estonte al A. De Keyzer, P. van Humbeekstraat 3 Brussel (West).

Subtenu vian ligon kaj revuon pagante tuj vian kotizon kaj abonon !

La Ligestraro.

# Esperanto in de Praktijk.

## BRAZILIE

Het Braziliaansch postwezen gaf een reeks zegels in het licht met tekst in 't Portugeesch en Esperanto. Het geillustreerd briefpapier welke in alle hoofdpostkantoren verkrijgbaar is, draagt voortaan den verklarenden tekst in 't Esperanto.

Alle officieele radio-mededeelingen zullen voortaan ook in het Esperanto worden uitgezonden.

## DUITSCHLAND

Het verbond der Deutsche fotografen organiseert een tentoonstelling te Frankfurt a/M. In de Esperanto-afdeeling werd een inlichtingsdienst voor vreemdelingen-Esperantisten ingericht.

## ENGELAND

Proeflessen werden gegeven voor 15.000 leerlingen en 500 onderwijzers van 101 scholen en onderwijsinrichtingen. Meer dan 6.000 leerboeken werden verspreid.

## FRANKRIJK

Door de stadsbesturen van Perpignan, Thiers, Houilles en Liévin werd besloten een straat of laan in elk dezer steden den naam van Dr Zamenhof te schenken.

Uit de verslagen voor het jaar 1935 der handelskamer van Parijs blijkt, dat Esperanto de meest gebruikte taal was voor de internationale briefwisseling. Het sekretariaat gebruikte Esperanto voor haar betrekkingen met 27 landen.

## JAPAN

De Nationale Maatschappij der Staatsspoorwegen gaf een nieuw, rijk geillustreerd prospectus, ten behoeve der toeristen, in het licht.

## OOSTENRIJK

De groote uitgeverfirma « Carinthia » te Klagenfurt, gebruikt Esperanto voor haar internationale betrekkingen. Het hooger personeel spreekt Esperanto.

## TSJECHO-SLOWAKIJE

Het radiostation van Brno welke ruim van Esperanto gebruik maakt voor haar uitzendingen, ontving, in 1935, 4125 brieven van Esperantisten uit 31 landen.

## NOORWEGEN

Het zendstation te Oslo gebruikt voortaan, benevens Engelsch, Fransch en Duitsch, ook Esperanto voor haar toeristische propaganda.

## NEDERLAND

Het « Utrechtsch Nieuwsblad » behelst voortaan een Esperanto-rubriek.

In 1935 verschenen 2.300 mededeelingen en artikels over Esperanto in 152 bladen. Voor het oogenblik publiceeren 16 dagbladen, 12 weekbladen en 5 maandbladen een Esperanto-rubriek.

De « Algemeene Nederlandsche Vereeniging voor Vreemdelingenverkeer » heeft een prachtige, in het Esperanto gestelde brochure van 24 bladz. laten verschijnen. Tal van kunstfoties en een kaart van Nederland verlichten deze uitgaaf. Zij is kosteloos verkrijgbaar bij: « Generala Nederlanda Fremdultrafika Unuiĝo ». Lange Voorhout, 102, Den Haag.

Het Bulletin der Vrienden van Sovjet-Rusland, dat in Nederland wordt uitgegeven, bevat ook een Esperanto-hoekje.

## Kion celas ni ?

Ni, t.e. la Flandra Ligo.

La celo de la Flandra Ligo unue estas esperantigi Flandrujon.

Pro tio la Flandra Ligo devas esti forta.

Forta ligo bezonas :

1. Estraron, kiu scias kion ĝi volas ; konas la irotan vojon, kaj ferme uzas ĉiujn necesajn rimedojn por atingi siajn celojn.

2. Fortajn sekciojn. — Ne nur grupoj, pli malpli memstarantaj, sed sekcioj, t. e. partoj de la Ligo, sur kiuj la estraro en ĉiu okazo povas sin bazi.

3. Entuziasmajn kaj laboremajn reprezentantojn en tiuj lokoj kie sekcio jam ne ekzistas.

4. Viglan kunlaboron inter la estraro kaj la sekcioj, kaj inter la estraro kaj la reprezentantoj.

5. Financojn. — Por efike labori ni bezonas monon; ne nur la ligo, sed ankaŭ la sekcioj.

*Kiamaniere Vi povos kunlabori.*

Vi, t. e. la membroj, la reprezentantoj, la sekcioj.

Ĉiu *membro* sin sciu membro ; t. e. kunmetanta parto de la sekcio; t. e. parto kiu havas specialajn devojn rilate al la sekcio. Se li ne plenumas siajn devojn, li malebligas, aŭ malpliviglas la sekcian kaj la ligan laboron. La devoj de la sekciaj membroj estas : sin perfektigi ; aktive kunvivi en la sekcia laboro ; senhalte propagandi, precipe laŭ la indikoj de la liga kaj sekcia estraroj.

La *reprezentantoj* : per tiu vorto ni indikas la personojn kiuj volas reprezenti la ligan en lokoj kie sekcio jam ne ekzistas ; — ilia ĉefa devo estas kiel eble plej baldaŭ starigi kaj vivteni sekcion. — Neniam ili devas opinii ke la cirkonstancoj estas malfavoraj.

Ĉian helpon ili trovos ĉe la estraro.

La *sekcioj*. La celo de la sekcio estas diskonigi Esperanton en la loka regiono. Pro tio ĝi ankaŭ bezonas viglan estraron ; multajn fervorajn anojn ; financojn kaj la volon atingi ion. Sed plej necesa por la ĝenerala sukceso estas la intima kunlaboro inter ligestraro kaj sekcio.

Por plifortigi la bazon de la sekcioj kaj plifirmigi la kunlaboron inter ligo kaj sekcio, la ligestraro jam prenis kelkajn decidojn, kaj ankaŭ prenos ĉiujn aliajn necesajn decidojn. Punkto post punkto ni per cirkulero diskonigos al la sekcioj la novajn aranĝojn. Sed, se la sekcioj ne pristudas kaj aplikas niajn proponojn, ne respondas al niaj demandoj, la estrarlaboro estos kaj restos vana. Kvankam diversaj entuziasmuloj jam multe laboris en diversaj lokoj, rezultoj preskaŭ ne estas, precipe ĉar ni nur dise laboris.

Tial, sekcioj, unuigu vin, unuigu viajn klopodojn, en kaj per la ligestraro. Nur per la intima kunlaboro de ĉiuj sekcioj grandskala laboro kaj grandskala propagando estas eblaj. Sen tiu kunlaboro neniam ni atingos nian celon : ESPERANTIGI FLANDRUJON.

LA PREZIDANTO.

# Over Esperanto

Ruim honderd jaar geleden werd in de kamer van volksvertegenwoordigers, in ons land, een wetsvoorstel neergelegd tot het aanleggen van een eerste spoorlijn. Groot was de tegenstand : honderde smeekbrieven en protesten werden ingediend, gansch het land stond in rep en roer en in de kamers zelf werd vinnig gestreden door vóór- en tegenstanders. Kwaad en onheil werden voorspeld, het was voor velen alsof het rijden van den eersten trein het einde der wereld zou inluiden. 't Is slechts dank zij de krachtdadigheid van enkelen dat het ontwerp werd aanvaard en uitgevoerd. — En nu ?

Gansch de wereldoppervlakte is doorsneden door spoorlijnen. Wij maken allen ruim gebruik van het treinverkeer — duizenden zelfs dagelijks — en zou het economisch leven die reusachtige ontwikkeling hebben gekend zonder het spoorverkeer ?

Voor ons, menschen van dit oogenblik, is het nut, de waarde en de noodzakelijkheid van de spoorwegen zoo klaarlijk, zoo onbetwistbaar dat we ons onmogelijk de mentaliteit kunnen indenken der menschen die, ruim honderd jaar geleden, die nieuwigheid bestreden. Al hun opwerpingen en voorzeggingen verwekken bij ons slechts een medelijdend schouderophalen. Wij kunnen niet begrijpen dat de menschen op dit punt eens zoo kortzichtig zijn geweest.

Zoo is 't gegaan met vele nieuwigheden, zoo gaat het, en zal het ook gaan met Esperanto. Eens werden alle mogelijke opwerpingen gemaakt om de ondoelmatigheid, de nuttelosheid en de onmogelijkheid van een internationale taal aan te toonen. De feiten hebben echter de twijfelaars in 't ongelijk gesteld. Door anderen — zoogezegd overtuigd van de noodzakelijkheid eener internationale taal — werd beweerd dat Esperanto niet de gewenschte oplossing bracht. Ook hier bewezen de feiten het tegenovergestelde.

Maar denk niet dat elkeen zich haasten zal om deze zoo nuttige en noodzakelijke taal aan te leeren. Bijna ieder, in privaat gesprek, zal onmiddellijk toegeven dat Esperanto buitengewone diensten zal bewijzen aan de gansche wereld ; maar onmiddellijk daarna zal hij trachten de noodige voorwendsels te vinden om zich aan de logische consequenties van zijn besluiten te onttrekken. De komende generaties zullen met begrijpelijke verwondering kunnen vaststellen dat wij, even kortzichtig handelden ten overstaan van Esperanto, als onze voorouders dit deden ten overstaan van het spoorverkeer. Voor hen zal het gebruik eener internationale taal zoo vanzelfsprekend schijnen dat ze niet meer begrijpen zullen, hoe het mogelijk was dat er eens menschen zijn geweest die het internationaal leven wilden regelen buiten de hulp eener internationale taal.

Eens hebben we gedacht dat Esperanto op het punt stond zijn uiteindelijke overwinning te behalen — 't was in 1922. De Volkenbond had zich de zaak aangetrokken. — Waar zou een internationale taal beter op haar plaats zijn dan in een Volkenbond ! — Een commissie werd benoemd met opdracht de kwestie der internationale



taal te bestudeeren en verslag uit te brengen over haar toenmalige verspreiding over de wereld.

De studie heeft maanden geduurd en toen, in September 1922 de besluiten werden openbaar gemaakt, waren deze, zelfs voor de meest optimistische Esperantisten een blijde veropenbaring. De uitslag van deze studie werd gedrukt en in verscheidene talen uitgegeven. — Maar hierbij bleef het; wat logisch op deze besluiten had moeten volgen, bleef uit.

We zijn nu 1936. Nog is Esperanto niet algemeen over de gansche wereld verspreid, alhoewel voor Esperanto een groote vooruitgang valt te boeken in de laatste jaren. Onderzoeken we den opgang der Esperantobeweging in de verschillende landen, dan stellen we vast dat de beweging met reuzenschreden vooruitgaat in die landen waar de officieele besturen en de leidende persoonlijkheden de beweging steunen of er aktief deel aannemen; noemen we Oostenrijk, Tsjecho-Slowakije, Polen, Nederland, Frankrijk, Zweden waar door ministers, volksvertegenwoordigers, burgemeesters, bisschoppen, universiteitsprofessoren, e. a. regelmatig in Esperanto voordrachten worden gehouden voor de radio, de Esperantobeweging wordt geleid of op bijzondere wijze gesteund. In Oostenrijk zal dit jaar het internationaal Esperanto-kongres plaats hebben, dit op uitnodiging der Oostenrijksche regeering. In Nederland werd, door toedoen van den Heer Burgemeester van Arnhem — zelf een ijverig Esperantist — een internationaal Esperanto-instituut opgericht. In Frankrijk bestaat er in het parlement een groepeerings die voor doel heeft Esperanto in de officieele middens in te voeren. Bij die groepeerings zijn meer dan 70 kamerleden aangesloten.

Waar zijn in ons land de ministers, volksvertegenwoordigers, burgemeesters, en andere officieele personen die daadwerkend de Esperantobeweging steunen? Er zijn er geen! En daar hebben wij zelf, Esperantisten, voor een groot deel schuld aan. Willen we de Esperantobeweging in ons land doen bloeien, dan moeten we trachten de leidende persoonlijkheden voor ons ideaal te winnen.

H. RAINSON.

## **Sur la sojlo de nova jaro**

En la momento kiam nia ligo eniras sian okan jaron, returna rigardo povas esti lerniga. La ĵus pasinta jaro, krom kelkaj rimarkindaj fortostreĉoj de izoluloj, i. k. la klopodoj de nia prezidanto estas speciale citindaj, similas al la ses antaŭaj, tio estas: ni paŝadis samloke, ni ne sukcesis plifortigi nian ligon. Ni povus konsoliĝi per la konstato, ke nia ligo, ankaŭ ne malfortigis, sed tia spiritostato estus danĝera, ĝi montrus inklinon al inertigo.

Kiam antaŭ kelkaj monatoj, en ligkunveno, aŭdiĝis kritikoj, multaj ĉeestantoj protestis. Sed iliaj protestoj pli koncernis la iom akran envortigon de la riproĉoj, ol la riproĉojn mem. Ĉiuj senescepte konsejis pri la multaj mankoj ekzistantaj en la ligaj organizaĵoj.

Unuflanke ni povas konstati, ke la respondecaj postenoj en nia

ligo peze premas la ŝultrojn de kelkaj aktivuloj, ne trovante helpon, post pli malpli longa tempo devas rezigni pro la amasiĝanta laboro. Aliflanke regas bedaŭrinda spiritostato ĉe la anaro. Estas fakto, ke la granda plimulto nur interesiĝas pri la kongresoj ĉar tie «regas la ĝojo de Flandra Kermes' ». Pri la stato de la ligo, la instituto aŭ la revuo, ili ne okupiĝas.

Plej tipa estas la kazo pri la organizado de la paroladoj de s-ano H. Thien. Tri sinsekvajn invitojn la liga sekretario tiurilate sendis al la sekcioj kaj propagandistoj. Malmultege estis tiuj, kiuj tuj post ricevo de la unua cirkulero ekzamenis la eblecon organizi paroladon. Kvazaŭ dormemulo, kiu finfine decidis ellitiĝi ĉar por la tria fojo li jam aŭdis la sonoradon de la vekhorloĝo, ili lastmomente ekagis.

La fakto, ke nia ligo jam ekzistas sep jarojn kaj ke nia revuo dume regule aperis ĉiumonate, tamen pruvas la viveblecon de nia organizaĵo en Flandrujo.

Bona organizo, racia kaj orda laboro flanke de la ligestraro, estas la necesegaj ecoj sen kiuj la Flandra Esperanto-movado eterne vegetos. Sed same necesa estas vigla kaj idealema spirito en la sekcioj kaj ĉe la izoluloj.

La dumkongresa estrarkunveno funde pristudis la nunan staton de nia movado kaj, post konstato de la mankoj, trafis gravajn decidojn. Ĝi fiksas la reciprokajn devojn de la ligo kaj la sekcioj, funde reordigis la ligan mastrumadon, decidis financajn ŝanĝojn kaj interkonsentis pri nova labormetodo por la estonto. Kelkajn el tiuj decidoj oni povos taksu iom drastaj, sed tiajn necesigas la sanstato de nia organizaĵo.

Se ĉiuj bonvole akceptas siajn reciprokajn devojn kaj laboras en la nova senco, ni ne staras sur la sojlo de nova jaro sed sur la sojlo de nova, esperplena epoko por nia movado en Flandrujo.

E. C.

*Vic-prezidanto.*

## **Flandra Ligo Esperantista**

### **GRAVA INFORMO AL LA MEMBROJ**

En la dumkongresaj kunvenoj estas aprobita la propono por financa reorganizo de la Ligo, kiun prezentis la vic-prezidanto Cortvriendt dum la ligkunveno en Gent, la 5-an de Aprilo (vidu bulletinon n° 11, Majo 1936).

La nova aranĝo modifas la rilatojn inter la Ligo kaj la sekcioj kaj la estraro juĝis necesa informi la grupojn per speciala cirkulero pri la nova labormaniero.

La teksto de art. 6 de la statutoj koncernante la aliĝon de grupoj estas reviziita kaj denove estos aplikata la paragrafo pri la deviga aliĝo de ĉiuj grupanoj al la ligo. Grupoj aliĝintaj kiel liga sekcio pagos poranan kotizon de 5 frankoj.

Por iĝi sekcio de FLE, lokaj unuiĝoj de esperantistoj, havantaj minimume 5 anoj, devas skribi peti sian akcepton. Ankaŭ necesas



ke la sekcioj aktive partoprenu al la asocia vivo ; tial, okaze de ligkunveno, ĉiu sekcio sendos delegiton aŭ, en okazo de pravigebla malhelpo, komunikos sian opinionon pri la tagordo.

La rubriko pri la grupa vivo en F. E. estos rezervita al la sekcioj.

Izolaj esperantistoj kiuj deziras fariĝi membro de la ligo, pagas kotizon de 5 frankoj. La abonprezo al F. E. restas 20 fr.

La kotizoj do estas jene fiksitaj :

membro (sen la servo de la bulteno) : 5 fr.

membro-abonanto : 25 fr.

abonanto (sen membreco) : 20 fr.

La estraro esperas ke ĉiuj izolaj abonantoj ankaŭ pagos la ligan kotizon.

La enkaso de « Flandra Esperantisto » servos por la administraj elspezoj kaj eldonaj kostoj de la revuo, kies financa organizaĵo de nun funkcios memstare.

La ligo enkaso servos por la administraj elspezoj kaj por propagandaj celoj.

En lokoj kie ne ekzistas sekcio, la ligo povas havi reprezentanton, kiu devas esti membro-abonanto.

La ligo ricevos membrokarton ; tiu karto servos kiel enirrajtigilo por la ligkunvenoj. La voĉdonrajto estas rezervita al la estraranoj kaj al la sekciaj delegitoj.

Koncerne al Flandra Esperanto-Instituto : provizore ne plu okazos ekzamenoj, ĝis fondo de speciala ekzamena komitato kaj fikso de regularo. Ankaŭ estos pristudata la ebleco por eldoni lernomaterialon.

FLE nun ekzistas sep jarojn kaj, se ni objektivite rigardas la faktojn, ni devas konstati ke la atingitaj rezultatoj ne estas proporciaj al la faritaj klopodoj. La estraro esperas ke la nuna reorganizo kaj la ordigo de ĉiuj laborfortoj markos novan periodon de progreso. La malnovaj metodoj sin montris maltaŭgaj ; la lastajn jarojn ni stagnaciis kaj stagnacio signifas reiron. Ni enkonduku ordon kaj solidaran laboron en niaj rangoj kaj la venko apartenos al ni.

LA SEKRETARIO

## **Mia rondvojaĝo en Flandrujo**

En ĉi-tiu artikolo mi volas iom rakonti al la gelegantoj pri mia rondvojaĝo, kiun mi faris en via lando dum la monato Majo. Kiel multaj el vi jam scias, mi estas profesoro laŭ la Cseh-motodo kaj instruis dum 7 monatoj en Francujo kaj tiam volis iom pli bone koni la nordan regionon de Francujo. Mi vizitis multajn urbojn tie kaj prelegis pri la sekigo de Zuiderzee. Post la vizitado de 15 urboj, mi plenumis mian promeson viziti ankaŭ Flandrujon. La Flandra Esperantista Ligo invitis min fari ankaŭ ĉe ili prelegojn pri la Zuiderzee, ĉu en Esperanto ĉu en Nederlanda lingvo laŭ la publiko, kiu vizitos la vesperon.

Mia vojaĝo komenciĝis en Kortrijk, kie mi havis la taskon traduki la ĉinan pastron Kao, kiu faris paroladon pri Ĉinujo en Esperanto. Tiam la ĉefa laboro venis, la instruo de la grandnombra publiko dum horeto pere de la Cseh-metodo.

La dua loko, vizitita de mi estis Ronse, kie okazis prelego pri la sekigo en Nederlanda lingvo kaj provleciono. Tiu vespero estis la plej vizitita. Tie la rezulto estis tiel bona ĉar la grupo faris bonegan propagandon kaj vendis antaŭe jam la kartojn.

Laŭ invito de izolulo en la malgrandega urbeto Vichte, mi iris tien kaj faris propagandparoladon en Nederlanda lingvo kaj Cseh-lecionon. Tiu sinjoro nun povis formi kurson, kiu enhavas sufiĉe multe da lernantoj.

\*N. E. L. E.\* (Nia Estas La Estonteco)  
 Flandra Esperantista Grupo  
 Ejo \* Breughel \*  
 Em. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)



Veurne, kie ne ekzistas Esperanto grupo tamen volis havi paroladon kaj la Willemsfonds organizis ĝin por povi admiri la grandan laboron de Nederlandaj inĝenieroj.

Nieuwpoort ankaŭ preferis havi nederlandlingvan prelegon por povi inviti neesperantistojn. Same kiel en Veurne grandnombra publiko ĉeestis.

Roeselare sekvis la ekzemplon de Ronse kaj faris la dupartan vesperon, do prelegon kaj provlecionon.

La vojaĝo iris de tiu urbo al tre malgranda loko, la vilaĝo Asten. La izola esperantisto Vanderlinden, volis iom pli bone interkonatiĝi kun la eksterlanda samideano kaj invitis min pasigi kelkajn agrablajn tagojn en lia hejmo. Volonte mi akceptis kaj li uzis tiun okazon por tutsole aranĝi esperantistan vesperon en Deinze, la apuda urbeteto, kie la internacia lingvo ankoraŭ estis unu el la neniam aŭditaj aferoj. Bonegan rezulton donis la propagandparolado kaj provleciono, ĉar kurso estas organizita.

Antwerpen tiam sekvis, kie la esperantistoj kunvenis por aŭskulti pri la sekigo de la Zuiderzee en esperanta lingvo.

Brussel atendis min, unue por la esperantistoj de la diversaj kluboj, kiuj kune aŭskultis kaj la postan tagon por la neesperantistoj, alvokitaj de la Flandra Turista Ligo (V. T. B.).

La prelegvojaĝo finiĝis en Mechelen, kie la grupo kaj la V.T.B. kune aranĝis paroladon pri Zuiderzee kaj Cseh-metodan lecionon.

Mia vojaĝo postlasis al mi agrablan impreson kaj mi dankas la Flandran Esperantan Ligon, kiu ebligis al mi fari tiun vojaĝon. Unue mi devas danki la sekretarion Debrouwere, ĉe kiu mi pasigis multajn tagojn kaj tie mi povis vidi kiel multe li laboras por plifortigi la movadon en Flandrujo. Tiu rondiro interkonatigis min kun multaj afablaj gesamideanoj kaj kompreneble, ke mi ne povos nomi ĉiujn personojn, kiuj agrabligis al mi mian restadon en Flandrujo. Certe mi tiam forgesus kelkajn, ĉar mi renkontis tre multajn bonajn homojn. Dankon mi esprimas al tiuj ĉiuj.

Se mi devas rakonti pri kelkaj apartaj aferoj, tiam mi volas diri, ke en Ronse mi vidis bonan organizadon. Tie la prezidanto De Boes bone aranĝis la propagadon. Multaj artikoloj aperis antaŭ kaj post la parolado en diversaj gazetoj, la membroj faris ankaŭ sian laboron, vendante kartojn, tiel ke multaj personoj aĉetis kaj se ili ne venis tamen pro tio ili subtenis la grupon. Tiu organizita antaŭvendado estas tre bona, ĉar multaj personoj bezonas instigon por povi foriri de la hejmo kaj viziti ĝin. Se ili aĉetas karton, tiam multaj pripensas : « Mi donis la monon do ankaŭ mi volas havi ion por ĝi ». Pro tio la nombro de la ĉeestantoj estis pli granda ol en la aliaj urboj. Tio ŝajnas al mi la ĉefa kaŭzo, ĉar aliaj cirkonstancoj, kiel ekz. vetero, estis ofte la samaj.

En Flandrujo estis diversaj grupoj kiuj opiniis, ke la vespero ĉe ili ne povos esti aranĝata. Generale la homoj estas tro pesimistaj ĉie : se oni volas, oni ofte sukcesas. Tion ja montris Vichte kaj Deinze. En la unua urbo la organizinto estas S.ro Van den Berghe, kiu loĝis tie nur dum kelkaj tagoj kaj tamen kuraĝis fari la vesperon. Ke li sukcesis pri tio vi povas legi en antaŭa numero, kurso eĉ funkcias. En la dua loko S.ro Vanderlinden faris propagadon kaj tie la sukceso ankaŭ estas tre kontentiga. Tiuj faktoj montras, ke en Flandrujo oni povas fari pli multe ol diversaj personoj opinias.

Mi renkontis en la grupoj diversaj tre laboremajn personojn, kaj per la rondvojaĝo mi havas la impreson, ke la esperantomovado en Flandrujo en la venontaj jaroj certe progresos.

H. THIEN.

# La Flandra Kongreso

La unua kongreso, kiun mi vizitis, estis la 7a. Flandra Kongreso en Gent kaj tuj mi volas diri, ke mi estas treege kontenta pri ĝi. Mi ne volis foriri el Belgujo antaŭ ol ĉeesti la kongreson. Mi jam legis plendon en la Flandra gazeto pri la kongresoj, sed mia opinio estas, ke sen plezuraĵoj, kongreso ne estas ebla, ĉar ĉiu komprenas, ke oni ne pasigas tri festotagojn en parolata kongreso, oni tiam pli bone povus vojaĝi al alia loko. Oni venas por havi kelkajn agrablajn tagojn inter gesamideanoj, kiuj tuj estas niaj geamikoj. Laŭ tiu vidpunkto la kongreso sukcesis.

Mi havas grandan estimon por la organizintoj de tiu kongreso, kiu okazis en urbo, kie ne ekzistas grupo, kaj kie kelkaj izolaj gesamideanoj devis fari la tutan laboron. Vere admirinde.

La festoj, la ekskursoj, la granda bankedo estis bone aranĝitaj kaj certe ĉiuj gesamideanoj estis kontentaj. Ĉiam gajeco regis kaj oni bone amuziĝis.

Mi estas feliĉa, ke mia unua kongreso okazis en Flandrujo kaj mi dankas la georganizintojn kaj ĉiujn ĉeestantojn pro la agrablaj tagoj, kiujn mi pasigis en la 7a. Flandra Kongreso.

HENK THIEN.

## Post la kongreso

Oficialaj fotografajoj de la Kongreso estas ankoraŭ haveblaj.

Mendojn oni direktu al Fino J. Terryn, Raapstraat, 82, Gent, pere de P. C. Konto 3309.23.

Al la antaŭpago oni aldonu la afrankon por alsendo.

Poŝtkartformato . . . . .	Fr. 2,—
Formato 13 × 18 . . . . .	Fr. 8,—
Formato 18 × 24 . . . . .	Fr. 11,—

Aliĝis al la 7a. Flandra Kongreso :

Flandroj . . . . .	152
Nederlandanoj . . . . .	46
Francoj . . . . .	5
Angloj . . . . .	4
Hindoj . . . . .	3
Danoj (el Finnlando) . . . . .	2
Germanoj . . . . .	2
Valonoj . . . . .	2

Entute 216 de 8 diversaj naciecoj.

La Organiza Komitato elkore dankas la gepartoprenintojn kaj speciale la eksterlandanojn pro ilia multnombra ĉeesto.

Ni esperas ke ĉiuj forlasis Gent kun agrablaj rememoroj, kaj ne diris al ĝi « adiaŭon », sed « ĝis revido ».

Ĉiam esperantistoj estos bonvenaj.

## Gratulo

Al S.ro Lucien Houpe, estrarano de la Ostenda Grupo Esperantista kiu edziĝis kun F.ino F. Geerolf el Bruĝo, la 5an de Majo, korege ni prezentas niajn gratulojn kaj bondezirojn.

## Dumkongresaj travivaĵoj

Sabaton vespere. En la « Raadskelder ». Diverskoloraj lumoj rebrilas en la okuloj de la gekongresanoj. Multaj konataj kaj multaj novaj vizaĝoj. Inter tiuj lastaj du fraŭlinoj, Cseh-metode instruitaj Esperantistinoj. La unu iom pli kuraĝa en la parolarto ol la alia. La plej kuraĝa malfermas la interparolon :

— Ĉu vi konas pastron La Brava, sinjoro ?

— Jes. Li ĉeestis ĉiujn kongresojn de la Flandraj Esperantistoj, same kiel mi. Cetere li konsistas el du partoj, nedisigeblaj.

La fraŭlinoj, samtempe, buŝoj malfermitaj.

— ? ?

— Jes. Unua parto : Li viro. Dua parto : « Lia Pipo ».

Silento. La du fraŭlinoj, el la urbeto Dhekoj, serĉas alian temon por priparoli kun la sinjoro el Sinjorurbo. Subite :

— Sinjoro, kio estas la Esperanto-vorto por « boodschap » ?

— Tre simple : « komisio ». Ekzemple vi povus diri : « Senprokraste mi devos fari komision... ĉu etan... ĉu egan ! ».

Reago : La unu ete ruĝiĝas ; la alia ege ridas. Konkludo : Ambaŭ komprenis.

Intertempe la kongreso, dancas. La sinjoro invitas la « plej kuraĝan » el la fraŭlinoj je danco. Dancante ŝi murmuris :

— Sed sinjoro, antaŭ kelkaj momentoj vi pretendis ke vi ne povas danci.

— Tre vere ! Mi nur marŝetadas laŭ la takto de la muziko kaj apogas min al vi.

Ŝi : « Ravige ! Ĉiele ! ! ».

Dimanĉon. Dum la festeno. Ĝi daŭras jam duonhoron kaj la supo... estas servota.

Sinjoro, al Pastro Delmuelilo el la urbeto Liro :

— Ni tuj preĝu, via Moŝto, oni jam senĉeligas la terpomojn !

La sinjoro : « La vino ŝajnas al mi bongusta. Sed mi tre ŝatus scii vian opinion, ĉar ofte mi aŭdis ke pastroj kaj monaĥoj estas tre kompetentaj vinkonantoj ».

Pastro Delmuelilo : « Jes, tion mi ankaŭ ofte aŭdis ».

La sinjoro, al sia ĉetabla najbarino, (« hazarde » unu el la Dhekojanoj) : « Ĉu vi jam spertis la bonajn sekvojn de la amikecaj rilatoj inter fiŝoj kaj porkoj, ».

La fraŭlino el Dhekoj (hezite) « Nnnne Sinj... »

La Sinjoro : « Nu, la fiŝoj ne povas ĉeesti la kongreson pro monaj aferoj kaj jen la porkoj, kiuj anstataŭas ilin per sia ŝinko ! »

Inter festeno kaj digestiga promenado surstrate. La suno por unu momento traboras la nubegojn kaj surlumas bele vestitan ĉarmulinon.

Sinjoro, al la ĉarmulino (mistere) : « Fraŭlino, mankas io al via kostumo ».

La ĉarmulino (terurigitaj kaj flustre) : « Kio do ? »

Sinjoro (galante) : « Paro da flugiloj ».

AŬSKULTEMULO.

## Diversaĵoj

La Oomota movado ŝajne ne fartas tre bone en Japanujo. Efektive, laŭ informo kiun ni legis en nacilingva gazeto, la registaro decidis detrui ĉiujn templojn de tiu religia sekto per dinamito. La kaŭzo de tiu severa kondamno estus kontraŭregistara agado. Oni do vidas ke faŝistaj ŝtatoj ne estas dolĉaj por siaj kontraŭuloj ! Ni esperu ke tiu afero ne havu malagrablajn rezultatojn por Esperanto, kiu ĝuis grandan favoron ĉe la Oomotanoj.

\* \* \*

En « Haagsche Post » de 23-5-36, ni legis preskaŭ nekredoblan historion pri la travivaĵoj de S.ano Van Megerem el Venlo, okaze de vizito al Düsseldorf. La lastan dimanĉon de Aprilo, tiu sinjoro, kun 2 aliaj Nederlandaj samideanoj, vojaĝis al Düsseldorf, por pasigi la tagon en amika kunesto kun la tieaj esperantistoj. Sed kio okazis ? Kiam ili sidis en restoracio por tagmanĝi, detektivoj venis kaj portis ilin ĉiujn, pli ol dudek personojn en la malliberejon, kie S.ano Van Megerem restis 4 tagojn akuzite ke li venis Germanujon por fari... komunistan propagandon. Oni severe traserĉis lin, eĉ la ŝtrumpojn kaj ŝuojn, forprenis kolumon, kravaton kaj pantalon-tenilon. Fine venis la Nederlanda limkomisario kaj savis lin el tiu barbara loko.

La aventuro mem estis doloriga, sed la epilogo plene kompensas pro ĉiu sufero, ĉar ĝi estas altgrade amuza. Imagu kio okazis : du semajnojn poste S.ro Van Megerem ricevis el Germanujo fakturon pri la restadkostoĵ en la malliberejo. La postulita sumo estas 9.74 markoj...

Germana partoprenanto al la Flandra kongreso en Gent, konfirmis ke efektive en Germanujo oni postulas pagon por restado en la malliberejo eĉ kiam oni estas malprave arestita... Feliĉa popolo ! Heil !

\* \* \*

De « Aŭstria komitato por la malliberejoj » ni ricevis leteron por informi la partoprenantojn al la Viena kongreso pri la persekutoj kontraŭ la demokrataj Aŭstrianoj, kaj por ke la delegitoj en la internacia E. kongreso levu siajn voĉojn por homdigna pritrakto de la politikaj malliberuloj, inter kiuj multaj esperantistoj, en Aŭstrio.

## Bibliografio

(Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas, unuope ricevitaĵn ni nur mencias. Verkoj, senditaĵ al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataĵ.)

### *KAROLINERNA VAN W. VON HEIDENSTAM.*

Wij, Esperantisten, kennen de Zweedsche letterkunde en houden ervan. Wij kennen Nobelprijs-winnaars als Sigrud Undset, maar von Heidenstam is ons in deze hoedanigheid minder bekend.

Wij, Vlaamsche Esperantisten, houden van schrijvers die in de nationale gedachte, in het eigen wezen van hun volk, inspiratie putten voor hun werk.



Hier brengt « Die Poorte » ons de eerste Vlaamsche vertaling van een prachtwerk in dien zin : wel gaat het over oorlogstafereelen, en daar houden wij niet van ; doch als die oorlogstafereelen ons het onzinnige van den oorlog, van toen en van nu, aantoonen, en ons tevens de grootheid, de offervaardigheid van een volk voor hun idealen verheerlijken, dan denken wij terug aan Groeninge, aan den Boerenkrijg, aan den lijdensweg van onzen Vlaamschen stam sinds 1914, aan Heldenhulde, aan IJzertoren.

Twee boeken van meer dan 275 bladzijden, vol anekdoten, origineel, ontroerend soms, afwisselend op meesterlijke wijze verteld, dat schenkt ons « Die Poorte », de Vlaamsche Boekengilde, in haar nummers 2 en 3 der loopende reeks, en dit aan den geringen prijs van 10 frank per boek in de serie genomen.

Prospectus en inlichtingen bij L. Calloens, Erembodegemstraat, 29, AALST.

## **Grupa Vivo**

*AALST — LA PACA STELO.*

Nova laborjaro por Flandra Esperantisto kaj Instituto, ankaŭ novan jaron ĝi signifas por la grupo « La Paca Stelo », ĉar fondiĝis ĝia grupo la 7an. de Julio 1929.

Kun plena fido en niaj diversaj gemembroj ni ekkomencos novan efikan agadon. Ni laboras kaj laboradas ĝis fino de la venko. Malgraŭ ĉio ni montros nin kiel Pacaj batalantoj por nia nobla kaj paca mondmovado.

Al ĉiuj membroj kiuj legos tiujn-ĉi liniojn, ni faras tre gravan alvokon por ĉeesti la ĝeneralan kunvenon, kiu okazos la 8an. de Julio, merkrede, en « Concordia » nia kunvenejo. Por refreŝigi la memoron de ĉiuj, tiun tagon nia standardo, jam bone konata en la urbo, flirtos al la fasado de la frua mateno.

En tiu kunveno, pliaj diversaj interesaj punktoj estos priskutataj kun la celo ĉiam antaŭenpuŝi nian lokan movadon.

Dum la sama monato ankaŭ okazos nia ekskurso bicikla al la monto St. Sauveur, nome la 19an. de Julio. Al tiu ekskurso ni postulas 25 gepartoprenantojn (almenaŭ).

En la proksima numero de nia inda revuo, ni priraportos pri la ĝenerala kunveno okazonta la 8an. de la nuna.

« Pacaj ge-Stel-anoj ! Kun freŝa espero al nova laboro.

*ANTWERPEN — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.*

La 23an de Majo S.ro Henk Thien faris en nia sidejo paroladon pri la sekigado de la Nederlanda Suda Maro. En bonaj kaj agrablaj esprimoj, li parolis al ni pri la loko kaj fluo de la maro kaj klarigis la diversajn uzitajn labormanierojn dum la pasintaj jaroj. Por fini kaj por pli bone komprenigi siajn klarigojn S.ro Thien montris al ni diversajn lumbildojn pri la laboroj kaj poste ankoraŭ kelkajn vidaĵojn de pitoreskaj Nederlandaj kostumoj kaj pejzaĝoj. La instruplena parolado finiĝis je la 10,30 h. kaj estis bedaŭrinde, ke nur tro malmultaj geanoj ĉeestis.

### *BRUGGE — KATOLIKA JUNULARA ESPERANTO-GRUPO.*

Certe la fervoro de niaj ripozemaj, silentemaj, burĝaj membroj devos esti pli malvarmigita. La salonestro plendis ke ni jam kelkfoje malfrue restis. Nia fervoro ? Jes, nia fervoro por la kantado kaj la laŭtvoĉa diskutado.

La 25an de Majo ĉiuj membroj... ĉeestantaj havis la plezuron aŭdi laŭtleĝon el Idista revuo de 1912. Temis pri la publika disputo Ido — Esperanto. La tempo pasis for, la historia perspektivo kuŝas nun sur ĝi. Ĝi aspektas nun mokridinda al ni. Sed tiam...

Sabaton, 2an de Majo, venis Onklo Johano el Haarlem. Neforges-eblaj horoj. Kiam nia amiko alvenis en Brugge, li tuj volis aĉeti Esperante redaktitan ĵurnalon ! Mia naiva amiko permesu ke mi diru tion.

Malgraŭ nia bona propagando, tre malmultaj venis. Post mallonga parolado, ni havis fruktodonan intertraktadon pri la organizo de la junulartagoj en Brugge. Sed ni devis daŭrigi ĝin la postan tagon, Dimanĉon, de la 11a. ĝis 13.15 h. !

Tiuj meritplenaj membroj estas fotografitaj, kaj do granda parto de la Esperantistaro povos admiri iliajn belajn kaj energiajn vizaĝojn !

Rapida tagmanĝo kaj for al vizito de la kampo de la Patroj Benediktanoj, kie ni starigos la tendaron.

Intertempe nia amiko rakontis plej ridindajn anekdotojn.

London li admiris la belan procesion de la Sankta Sango.

Tro rapide tiuj horoj forflugis. Ni senpacience atendas la 24an. de Aŭgusto. El nia kongresa karavano devis forfali du membroj, je la lasta minuto ! La profesoro prezentis pri ĝi raporton kiu estos akre atakata venontan sabaton. Do, ĉiu sur sia posteno ! ;

### *BRUSSEL — N. E. L. E.*

La esperantlingva parolado pri la sekigo de la Suda Maro, kiun faris nia Nederlanda S.ano H. Thien, bone sukcesis ; pli ol 40 esperantistoj ĉeestis.

La nederlandlingva parolado en « Vlaamsch Huis » pri la sama temo, allogis 50 personojn, precipe anojn de la loka V. T. B.-sekcio. Post la parolado sekvis mallonga provleciono. Nia amiko Thien montrigis lertega Ce-instruisto. Post 20 minuta leciono li faris, en Esperanto, paroladeton kiu daŭris 10 minutojn. La ĉeestantoj, kiuj neniam antaŭe aŭdis Esperanto-vorton, miregis pro la fakto ke ili ĉion komprenis. Ilia entuziasmo estis granda kaj multaj sin anoncis ĉe nia sekretario por ricevi pluajn klarigojn pri Esperanto.

### *DIKSMUIDE.*

Verŝajne en neniuj Flandra urbo oni tiom multe uzas Esperanton por praktikaj celoj ol en Diksmuide. Jam aperis : turista faldfolio, reklamfolio por la Izermonumento, afiŝo por la Izermonumento ; en preparo estas turista broŝuro kvinlingva kun E-parto. Ĉion tion-ĉi ni dankas al la klopodoj de S.ano Marcel Maekelberg gardisto de la Izermonumento, kiu ankaŭ starigis grandan tabulon kun E-teksto ĉe la eniro de la monumento.

Gis nun S.ano Maekelberg direktis ĉiujn siajn klopodojn al uzo de Esperanto ; ĉi tie ni esprimas la deziron ke amiko Maekelberg ankaŭ realigu la jam de longe faritan proponon, nome malfermi kurson kaj starigi grupon ; samtempe estus okazo por akiri kunlaborantojn.

#### *MECHELEN — LA ESTONTO.*

De post la fino de la Ĉseh-kurso la ĉeestado de la grupkunvenoj estas bona. Tamen, bedaŭrinde, la malnovaj membroj nur aperas neregule. Ni reorganizis la estraron de la grupo. S.ro Rainson, provizore restas prezidanto, S.ro Van der Poel restas sekretario, kaj ni elektis kiel vic-prezidantino Fraŭlinon Van den Eynde, kiel kasisino Fraŭlinon Van Boxelaer, kiel help-sekretariino S.inon Simoens, kiel Bibliotekisto S.ron De Winter Pol kaj kiel komerca kasisino Finon. Herckens.

Dum la unuaj monatoj parto de la kunveno estas perfektiga kurso, ni uzas la libron « La ĉiutaga vivo ». Dua parto temas pri diversaj aferoj, kaj neniam mankas la kantado.

La 15an. de Majo nin vizitis tri samideanoj el Leiden, piedirantaj tra Eŭropo. Ili rakontis nin pri la Popolaj Universitatoj en Nederlando-neŭtralaj institutoj, kie speciale la senlaboruloj povas sin instrui.

La 29an. de Majo okazis en kunlaborado kun V. T. B. Mechelen, lumbilda vespero pri la « Sekigado de la Suda Maro ». S.ro Henk Thien rikoltis multan sukceson per siaj tre interesaj bildoj, sed nin, esperantistojn, plej mirigis la majstra maniero laŭ kiu li donis la provlecionon Ĉseh-metode. Tamen la hazardaj lernantoj ne estis tiel viglaj ol la plenkuraĝuloj de nia lasta vintra kurso. La partoprenado al la Genta kongreso povis esti pli bona. Eble niaj junaj samideanoj, kiuj la sekvontan jaron estos plenkreskuloj, pli multnombre ĉeestos en Leuven.

#### *OOSTENDE — OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.*

Je la fino de Majo finiĝis la Ĉseh-kurso, donita de Sino. C. Ornstein. Gis la lasta leciono ĉeestis ĉiu enskribito. Nur en la komenco forrestis du lernantoj. La Ĉseh-kurso kiu altiris entute 24 lernantojn, donis al nia grupo 14 novajn membrojn, el kiuj jam kelkaj ĉeestis la hodiaŭ-jaran kongreson. Baldaŭ la grupo reorganizos la somerajn ekskurson biciklajn, nia unua estos al Lophem. Ĉar la someraj monatoj por Ostendo baldaŭ komencos, ni ĉesigos la kunvenojn post Junio en la Hotelo Metropole.

#### *ROESELARE — RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO.*

Silentis dum la lastaj monatoj la raportanto en tiu rubriko. Ĉu eble tiu silentado estas la fatala antaŭsigno de baldaŭna funebra anonco pri la grupo Roeselare ? NE, la R.e.g. energie laboras por la konservado de la jam konvertitoj, kaj por la formiĝado de novaj adeptoj. La klubkunveno bonprosperas dank' al la unueca kunlaborado, kunŝnurante la membraron, dank' al la severdifinita ĉefcelo : akcelo de nia esperantisma idealo, eklerno kaj la praktikado de nia lingvo.

La amuzo servu nur kiel kunfaktoro por la grupa florado, zorgante ke la kontraŭo, t. e. : ke sen amuzo la grupo ne estu vivtenebla.

neniam efektiviĝu. Kutime la ĉeestantnombro dum la semajna kunveno atingas 20. La grupo aranĝis publikan kunvenon okaze de la rondvojaĝo de S.ano H. Thien. Kiel digna partopreno al la kongreso ni sendis 15 partoprenantojn al Gent.

### VICHTE.

Post la provleciono de S.ano Thien, malfermiĝis kurso kun 19 gepartoprenantoj kaj el ĝi certe estiĝos grupo. Ĉar la vilaĝo nombras apenaŭ 2.000 loĝantojn, estas vere granda sukceso. Imitinda ekzemplo por la izolaj samideanoj el malgrandaj lokoj kiuj opinias ke nur en urboj ekzistas intereso por Esperanto.

## La angulo de la serĉemuloj

Al la ensendinto de la plej bonaj solvoj, ni promesas belan premion. Ĉiu solvita vorto valoras por 1 poento. Le premio estos do por tiu, kiu akiros la plej altan nombron da trovitaj vortoj.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Aŭgusto rekte al S.ro F. Volders — Bredastraat, 94, — Antwerpen. Bonan ŝancon !

### SOLVO DE PROBLEMO 6


#### Horizontale :

1) ege-mia ; 2) t-ns-da-m ; 3) Esperanto; 4) el-e-ke; 5) envio; 6) ek-u-mi; 7) Antwerpen; 8) r-ae-ea-e; 9) ted-sep.

Inter la multaj ensendintoj de bonaj solvoj, la du sekvantaj samideanoj gajnis premion, kiun ni alsendos post kelkaj tagoj : S.ro Pittoors el Antwerpen kaj Fraŭlino E. Callewaert el Roeselare.

### PROBLEMO 8 : MURFASADENIGMO

Sur ĉiu ŝtono unu literon. Ĉiu sekvanta vorto enhavas la antaŭajn literojn kaj oni aldonu ĉiufoje unu literon. Je la 8a vorto oni malpliigu la vortojn je unu litero.



- 1) Konsonanto.
- 2) Sufikso.
- 3) Kolekto.
- 4) Fajro (figura).
- 5) Parto de la suno.
- 6) Parto de planto.
- 7) Komenci amegi.
- 8) Bruado per la voĉo.
- 9) Estas ĉirkaŭ pentraĵo.
- 10) Parto de veturilo.
- 11) Kajo.
- 12) Metallo.
- 13) Vokalo.

---

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.

**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).

**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.

**Postcheck:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel. Nr 2321.50.

**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.

**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

### **AFDEELINGEN :**

#### **Alle inlichtingen verstrekken verder te:**

**Diksmuide:** M. Maelberg, Wilgenwijk, 28.

**Gent:** Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.

**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat.

**Hoboken:** J. de Groot Caronstraat, 31.

**Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.

**Millen (Tongeren) :** L. Geukens, Langstraat.

**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.

**Ronse:** « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.

**Thielt :** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

**Wilrijk:** Daniel Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

**Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.

---

---

OSTENDO

# HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

5-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

### OSTENDO Hotel-Restaurant VROOME

Bulvardo Rogier 20. Tel 37

Moderna komforto — Moderaj prezoj — Varma kaj malvarma akvo fluanta.

*Prenu urbotramon 5 aŭ 6*

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



**Varbu**

**Abonantojn**

**kaj**

**Anoncantojn !**

Speciale rekomendita Restoracio

## „ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.